„Mutig vorwärts!“

Aŭstria Esperantisto

„Kuraĝe antaŭen!“

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Jarabono (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, ...gebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 4.—; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. Leteradreso: Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

...ro 12 (137) | Korneuburg ĉe Wien, la 5. decembro 1936. | 13. jaro

Unu lingvo por travojaĝi la mondon.

Joseph R. Scherer, prez. de Amerika E.-Asocio, Los Angeles.

Centmiloj da homoj vojaĝas tra fremdaj landoj kaj eĉ ĉirkaŭ la mondon ...ante nur unu nacian lingvon. Sed la demando estas, kiom da ĝuo — mensa ...spirita — ili spertas, — kiom ili vidas.

Ekzistas la ĝenerala superstiĉo, ke per la angla lingvo oni povas facile ...aĝi tra ĉiuj fremdaj landoj. Sed dum diversaj vojaĝoj tra 47 landoj — ...la lastaj kelkaj jaroj — mi povis fari multajn observojn, kiuj pruvas ...malverecon de tiu aserto. Eble la fakto, ke mi faris pli ol 1000 lumbild-...oladojn en ses diversaj lingvoj estas por vi iom da garantio, ke mi diros ...vi ne fanfaronaĵojn sed interesajn faktojn.

Dum miaj diversaj paroladvojaĝoj tra Usono oni diras al mi konstante: ...o mi vojaĝis tra tuta Eŭropo kaj ĉie oni parolis la anglan lingvon.“ Sed ...mi komencas demandi: „Kiaj homoj parolis kun vi?“ ili respondas: ...servistoj en la hoteloj, vendistoj en la memoraĵ-vendejoj, la kelneroj en ...aj bonaj restoracioj kaj la gvidantoj de turist-aŭtobusoj.“

Sed kiam mi plue demandas, ili komencas konfesi, ke ili nenion interesan ...vis lerni de tiuj porturistaj servistoj, ke fakte ili povis respondi nur al ...plej simplaj demandoj pri litoj, manĝaĵoj kaj memoraĵoj. Kompreneble ...servistoj de la turista trafiko estus stultaj, se ili ne lernis almenaŭ ...kajn frazojn, se ili povas profiti el tio. Sed, se ili konstatas, ke la turisto ...havas tre multan monon en la poŝo, ili ne volas kompreni eĉ la plej ...plajn anglajn vortojn. Do al la turisto, kiu fanfaronas en Usono, dirante, ...la angla lingvo estas „ĉie“ parolata, mi respondas, ke „por la turisto ne ...angla lingvo estas la internacia lingvo, sed la Dolaro en la poŝo“.

Cetere la franca kaj germana kaj la hispana lingvoj estas same internaciaj ...la angla . . . en la diversaj rondoj de la societo. Inter sciencistoj kaj ...versitataj profesoroj la germana lingvo estas multe pli ĝenerale kaj flue ...olata ol la angla. Inter la anoj de la aristokrataro kaj de la eleganta ...ieto la franca lingvo estas parolata en ĉiuj landoj de la tero. Nur por la ...merco — importo kaj eksporto — por la luado de hotelĉambroj kaj ...adado de memoraĵoj la angla lingvo estas pli malpli „universala“. Sed por ...mo, kiu deziras vojaĝi pli inteligente, por la viro kaj virino, kiuj deziras ...i ion pri la animo kaj koro de fremdaj popoloj, ne estas pli bela kaj pli ...iga lingvo en la tuta mondo ol Esperanto. Mi mem konstatis, ke nun ...ŝkaŭ en la tuta mondo vivas esperantistoj. Estas vere, ke en kelkaj urboj ...as nur 2000 aŭ 500 aŭ eble nur 50 samideanoj. Sed tio ne ĝenas la ...ĝantan esperantiston. Li ja ne povus premi la manojn de pli ol 1000 ...ideanoj, kiam li alvenas en Stockholm aŭ en Sofia.

Sed tiuj, kiuj venas al la stacidomo por saluti samideanon, ĝenerale apar-...as al la pli inteligentaj (aŭ pli interesaj) loĝantoj, ĉar per la studado ...Esperanto ili pruvis, ke ili havas mensan horizonton, kiu transiras la ...ojn de siaj propraj landoj. Kaj samtempe ili ĝenerale estas ankaŭ pli ...aj patriotoj ĉar ili scias, ke nur per universala paco la patrolando povas ...esperi plej bone.

Ĉiu malkontenta turisto, kiu havas lingvajn malfacilaĵojn en fremda lando ...as unu paŝo al malamikeco kaj al nova milito. Sed ĉiu feliĉa esperantisto,

Kastelo Ambras.

De sur arbarita altaĵo de la suda Mezmontaro ĉe Innsbruck nun jam depost jarcentoj majesta, turornamita kastelo malproksimen rigardas en la pitoreskan valon de Malsupra Inn-rivero, KASTELO AMBRAS, envolvita de la floroj el historio kaj sageo kiel amorestadejo de artama suvereno.



Kastelo Ambras ĉe Innsbruck. Foto: R. Müller-Innsbruck.

Jam la romanoj estis konstruintaj sur la roko fortikaĵon, kiu dum la tempo fariĝis kastelo, kies posedanto sanĝiĝis ĝis la 16. jarcento. En 1653 imperiestro Ferdinand I., rekonstruis la kastelon kaj donacis ĝin al sia filo Ferdinand II., kiu rezidis depost 1567 en Ambras kiel reganto de Tirol. Kun la princovivis lia edzina moŝto, la fambela patricia filino Philippine Welser el Augsburg, en kastelo Ambras, kiun la arkiduko plukonstruigis kiel somerrezidejon kaj ĉirkaŭigis per grandioza bestparko, kiu enhavis diversajn akvoartaĵojn kaj aliajn amuzaĵojn.

kaj revenas hejmen el fremdaj landoj kaj rakontas pri la ĉarmaj kaj amikaj popoloj, estas unu plia paŝo al universala paco. Ĉar la ordinara turisto plendas pri la profitemo de la hoteloj kaj pri la malafablaj servistoj — sed la esperantisto rakontas hejme kiel samideanoj ĉie helpis al li pli-agrabligi la vojaĝon — simple per la uzo de unu magia lingvo — Esperanto.

En Azio, Afriko, Eŭropo kaj Ameriko mi renkontis multajn esperantistojn, kiuj deziris helpi al mi, por ke mi komprenu iliajn patrolandojn pli bone kaj respektu iliajn popolojn pli sincere.

Ili venis al la stacidomoj, por saluti min, kaj ili alportis florojn kaj ĉarmajn ridetojn. Ofte okazis, ke 30 ĝis 50 gesamideanoj venis, por bonvenigi min. Ofte mi skribis simplan poŝtkarton nur du tagojn antaŭe al adreso, trovita en la plej utila libro por vojaĝanta esperantisto — en la jarlibro de Universala Esperanto-Asocio. Ofte mi ricevis kvin ĝis dek invitojn, por dormi en tiom da hejmoj en la sama vespero. Kompreneble mi ne povis dormi en pli ol unu lito en la sama nokto, sed ili devigis min manĝi en 4 — 5 — 6 diversaj hejmoj en la sama tago. En Japanujo mi devis fari tiom da vizitoj, ke mi devis trinki ĝis 25 tasojn da teo ĉiutage. Iom post iom mi akiris internacian stomakon (aŭ apetiton). En ĉiuj landoj ili petis min senti min tute hejme. Ili invitis min ludi kun la infanoj. Mi trovis milojn da infanoj, kiuj bele babilas nian universalan lingvon. Ili permesis al mi, fotorgafi ĉiun detalaĵon de la familia vivo — nur ĉar ni povis kompreni nin en Esperanto. Dank' al Esperanto mi sukcesis fari pli ol 35.000 fotografaĵojn pri la hejma vivo en 47 landoj. Por mia profesio de paroladisto kaj ĵurnalisto tio estis grava avantaĝo. Sen Esperanto mi ne povus fari la samajn bildojn — eĉ se mi vivus 200 jarojn. Kiom da ordinaraj eŭropanoj invitus azianon en siajn hejmojn? Japano ekzemple ne deziras inviti eŭropanon al sia hejmo eĉ, se li parolus la japanan lingvon. Sed dum la unua semajno de mia restado en Japanujo mi jam faris 800 bildojn pri la hejma vivo de tiu interesega lando.

Miaj gastigantoj ne pensis pri mona profito, kiam ili lernis Esperanton. Nek ili pensis pri mono, kiam ili gastigis min. Esperantisto bonvenigas samideanon kiel honoran gaston. Li ne demandas, ĉu la vizitanto havas monon en la poŝo. Tute amike li rakontas al la gasto pri la belaĵoj de siaj lando kaj popolo. Per tio li kreas amikecon por sia patrolando. Certe esperantisto estas pli bona patrioto ol iu alia lingvisto, kiu lernas ekzemple la anglan lingvon por vendi hotelĉambrojn kaj memoraĵojn je pli alta prezo.

Kio okazis al mi en ĉiuj partoj de la mondo, okazas al ĉiu alia esperantisto en ĉiuj partoj de Eŭropo en ĉiu tago de la jaro.

Sed se samideano preferas loĝi en hoteloj, eĉ tiam la esperantistoj helpas al li. Ili kondukas lin al la por li plej taŭga hotelo, akiras la phej favorajn prezojn kaj volonte kondukas lin tra la urbo tute senpage kaj invitas lin hejmen por ripozi. Kiom da ne esperantistoj estus pretaj tion fari? Eĉ en sia propra patrolando en fremda urbo esperantisto estas feliĉa, kiam samideanoj helpas al li ĝui la viziton.

Esperanto ne estas nova ideo en la mondo. En Hindujo, kie la loĝantoj parolas centojn da diversaj lingvoj, ili ne postulas, ke certaj lingvanoj lernu la lingvon de aliaj partoj de Hindujo. Male ili ĉiuj lernas specon de internacia lingvo, nomata hindustani, kaj ili bone sukcesas kompreni sin reciproke... Same en la multaj insuloj inter Azio kaj Aŭstralio mi konstatis, ke oni parolas multajn diversajn lingvojn. Sed ili ĉiuj samtempe lernas la malajan lingvon, kiu fakte estas la Esperanto de la malaja insularo.

Klera javano diris al mi: Tiuj malhel-haŭtuloj ne povas ĝenerale legi kaj skribi, sed almenaŭ ili povas babili kun fremdlingvanoj sen ia malfacilaĵo.

Sed tian simplan solvon la civilizitaj eŭropanoj kaj amerikanoj ankoraŭ ne pli ĝenerale povas imagi. Por ili la ideo de neŭtrala internacia lingvo estas tro simpla. Ili preferas fordoni centojn kaj milojn da horoj por komenci lerni lingvojn, kiujn ili neniam sukcesos praktike uzi. Ekzemple en Usono malpli ol unu el 1000 gejunuloj, kiuj komencas la studadon de fremda lingvo en mezgrada lernejo, iam kapablos paroli ĝin. Samtempe la plej multaj angloj kaj usonanoj konfesas, ke la angla estas treege komplika lingvo. Fakte ili devas trairi kolegiojn kaj universitatojn, por vere bone lerni sian gepatran lingvon, kaj eĉ poste konstante devas uzi la vortaron. Sed ili samtempe postulas, ke la angla lingvo estu la universala. Ĉu ne paradoksa malĝentilaĵo? Fakte ili devas esti kaj estas kontentaj, se fremdlandano ĝin nur mizere parolas kaj tiel kripligas la por ili belan lingvon.

La floradepoko de l' kastelo komenciĝis kaj finiĝis per la multmovata vivo, kiu envenis ĝiajn murojn kun Ferdinand kaj Philippine kaj la ambaŭ filoj Karl kaj Andreas. Philippine tiel ekamis la kastelon, ke ŝi dum la tuta jaro loĝis tie, modele plenumis siajn patrinajn kaj mastrinajn devojn kaj baldaŭ estis amegata en la tuta ĉirkaŭaĵo pro siaj bonkoreco kaj popolemeco kiel popolpatrino.

Sekvante la guston de sia epoko la arkiduko igis sian kastelon centro de kortega vivo kaj pompa sociemo. Gastoj el ĉiuj landoj rajde venis al Ambras, trovis sian ĝuon ĉe la riĉeprovizitaj festenoj de la suvereno, kies edzina moŝto, mem bonega kuiristino, zorgis pri la korpa bonfarto de siaj gastoj, provis en Bakuso-groto — enroka groto en la parko, ankoraŭ nun videbla — sian trinkulecon kaj poste enskribis siajn nomojn en la famajn „trinklibrojn" de Ambras.

Sed arkiduko Ferdinand kiel vera renesanca princo estis ankaŭ varma amiko al la artoj kaj kolektanto, kiu aĉetis armaĵojn, portretojn, librojn, manuskriptojn, kuriozaĵojn ktp. en la tuta mondo kaj ekspozis ilin en la kastelo Ambras. Tiel estiĝis la fama kolektaĵo en Ambras, kiu depost 1806 grandparte estas konservata en Wien. Sed nun la kastelo tamen rericevis partojn de siaj art- kaj kulturtrezoroj kaj pro tio prezentas unikan vidindaĵon.

Tra la blazonornamita belega pordego oni atingas la grandan korton, kiu dekstre en kelkaj salonegoj enhavas la faman armilar-kolektaĵaron: kirasoj, armaĵoj por kavaliroj kaj ĉevaloj, armiloj ĉiuspecaj ktp. Vidalvide al la malgranda arteca renesancputo, kiu ŝprucas en la korto, etendiĝas la granddimensia „Hispana salonego", kiu ankoraŭ restis tia, kia ĝi estis konstruigita de Ferdinand. Marmoraj ŝtonplatoj kovras la plankon, riĉeskulptita arteca plafono, belegaj vandoportretoj de tirolaj suverenoj kaj bela kolekto de kornoj ornamas la 43 m longan salonegon. Super ĝi estis konstruita „Hochschloß" (altkastelo), kiu prezentas en siaj salonegoj ankoraŭ tute la epokon de Ferdinand kaj Philippine. Plejgrandparte la origina meblaro enestas, speciale la aparta banĉambro de la kastelestrino kun la zinke garnita baseno rememoras longe pasintajn loĝkutimojn.

Nuntempe kastelo Ambras denove enhavas la plej grandan parton de la iama „Art- kaj miraklo-ĉambro" amaso de valoraj kaj maloftaj produktaĵoj de antikva mecenoj. Dum horoj oni povas trairi la salonojn de la kastelo, ĉiam denove rigardo kaj scivolo estas altirataj. De la altano de l' kastelo malfermiĝas senkompara panoramo al Innsbruck kaj Inn-valo. Naturamikoj promenas tra la belega parko, ripozas en tiu ombro kaj ĝuas de ĉiuj flankoj la belegan rigardon al la kastelo, kiu kun siaj turoj ĉiam denove altiĝas super la verdaj arbopintoj.

Tiel vizito al kastelo Ambras kaj ties mirinda ĉirkaŭaĵo restas por ĉiu travivaĵo neforgesebla.

Landa fremdulofícejo por Tirol

La Katedralo en Klosterneuburg

Al kompleta kaj karakteriza bildo de la urbo Wien apartenas la konturoj de Kahlenberg kaj Leopoldsberg. Tiuj montoj estas tiom ligitaj kun Wien, ke ili farigis ekkoniloj de la urbo same kiel la turo de la katedralo de Sa. Stefano. Dum ĉiuj sezonoj amaso da homoj venas tien, piede, bicikle aŭ aŭtomobile, allogitaj de la belaĵoj, kiujn prezentas ambaŭ montoj: belegaj panoramon oni povas ĝui el la hotelo kaj de la belvedera turo sur Kahlenberg kaj el la restoracio sur Leopoldsberg, kiuj montoj estas interligitaj per la fama surmonta ŝoseo, konstruita lastatempe kaj majstroverko de moderna ŝosekonstruado.

Mondfamon havas la du montoj pro la grava rolo, kiun ili ludis en la historio de Wien kaj Aŭstrio: sur Kahlenberg situis la burgo de la grafoj de Babenberg kaj tie ili restis ĝis ili ekrezidis en Wien nom. En 168

Por mia laboro kiel geografia paroladisto kaj universitata prelegisto mi konstatis, kiom Esperanto helpas profesie. El miaj mil ĝisnunaj paroladoj mi donis pli ol 300 ekster Usono. Kelkajn mi faris en naciaj lingvoj, sed kiam ajn traduko devis esti farata, oni preskaŭ ĉiam petis min paroladi en Esperanto, ĉar estis pli facile kaj ofte la sola ebleco por trovi taŭgan interpretiston por traduki miajn vortojn en la lokan nacian lingvon.

Jen alia konkreta ekzemplo: Antaŭ du jaroj mi volis malfermi poŝtan ĉekkonton en grava svisa urbo. En la telefon-libro de Los Angeles troviĝas pli ol 100 personoj kun la nomo Scherer, kun ekzakte la sama skribmaniero. Telefonante al dudek mi eltrovis, ke nur unu el ili komprenis la germanan lingvon.

Do mi skribis de Los Angeles anglan leteron al la poŝta administracio de iu urbo petante informojn. Sed — la respondo estis en germana lingvo. Por via informo kaj eble por via amuziĝo mi tradukas por vi la lastan paragrafon: „Fine ni deziras peti vin, skribi al ni en germana aŭ franca lingvo, ĉar la anglan lingvon ni ne scipovas uzi.“ Jen bona letero, kiun mi ofte uzas, kiam oni volas al mi certigi, ke eĉ en Svislando ĉiuj homoj parolas la anglan lingvon. — En la poŝtoficejo iu oficisto eble kapablas vendi poŝtmarkojn sed ne pli.

Antaŭ tri jaroj aperis ĉe la oficiala presejo de la granda Columbia University de New York dikega libro pri „Cosmopolitan Conversation“ (Internacia Konversacio), verkita de la fama usona profesoro Gerbert Newhard Shenton. El ĝi mi ankaŭ tradukis paragrafon, por montri al vi kiel en Usono eĉ pli serioze interesiĝas pri Esperanto:

„La grava demando estas, kiel homoj de diversaj lingvoj povas paroli kune? Tiu ĉiam-ekzistanta problemo de internacia komunikado depost longa tempo estis esti la zorgo de revemaj idealistoj kaj estas nun ĉefa, urĝa, kaj praktika problemo de realistoj. Facileco en komunikado inter popoloj de diversaj lingvoj ne plu estas luksaĵo sed necesajo . . .“

Oni povus skribi dikajn librojn pri la utiloj de Esperanto. Sed hodiaŭ mi nur penis montri al vi, ke „Unu lingvo por travojaĝi la mondon“ ne estas utopia revo, sed jam realaĵo. Esperanto estas tiu UNU lingvo, kiu helpas en ĉiu lando. Esperanto ĝenerale valoras nur por faciligi la transiron de landoj. Sed Esperanto estas verda, universala pasporto. Neniu povas ŝteli ĝin el via koro. Male ĝi faciligas la eniron (ne nur en la landojn sed ankaŭ) en la korojn de sampensantaj homoj en ĉiuj partoj de la mondo.

(El la libro „XI. Somera Universitato Wien 1936.)

Klosterneuburg.
Klišo de Fremdenverkehrsstelle de urbo Wien.

kiam la turkoj sieĝis Wien, kolektiĝis sur Kahlenberg la helpa armeo de la kristanoj, gvidita de la germana duko Karl von Lothringen kaj la pola reĝo Johann Sobieski, kaj en la preĝejo, dediĉita al Sa. Jozefo, la fama kapucena pastro Marco d'Aviano legis la meson antaŭ la decida batalo, en kiu la kristanoj la 12. de decembro liberigis la urbon de la turkoj kaj per tio la tutan kristanaron de la plej granda danĝero, kiu dum la lasta jarmilo minacis ĉiam denove la okcidenton.

Sur Leopoldsberg en 1101 markgrafo Leopold III., la Sankta, el la gento de Babenberg, konstruis kastelon. kies kapelo ankoraŭ ekzistas sub la nomo Leopold-preĝejo, novkonstruita de imperiestro Karl VI.

Sed Leopold ankaŭ konstruigis la monaĥejon Klosterneuburg, pri kiu la legendo rakontas: Kiam foje la markgrafo staris kun sia edzino sur balkono de l'kastelo, vento forŝiris la vualon de la markgrafino. Malgraŭ diligenta serĉado oni ne povis trovi la vualon. Leopold votis fondi monaĥejon tie, kie la vualo estos trovita. Post kelka tempo la grafo dum ĉasado trovis sur arbusto la valoran vualon kaj tie li fondis Klosterneuburg (en 1106).

Imperiestro Karl VI. pligrandigis la monaĥejon kaj el tiu tempo originas „Kaisertrakt“ (imperiestra parto) de la monaĥejo, kiu estas brila ekzemplo de Wien-a altbaroko. Oni eniras la monaĥejon tra Bernardi-pordego kaj la antikva gotika „Akvopordego“ en la eksteran korton, kie dum 700 jaroj logadis la abatoj. Cirkaŭ Leopold-puto, sur kies meza kolono estas statuo de la Sanktulo, grupiĝas la konstruaĵoj: la gotika sud-okcidenta parto kun ĉarmaj fenestrobalkonoj kaj niĉoj, sudoriente Thomas-prelatejo kaj kontraŭe la loĝejo de preposto Andreas Mosmüller, nordoriente la malnova „Refektorium“ (manĝejo) kaj la fama kuirejo de la konvento.

Tra la efika peristilo ni venas al la monaĥeja placo kun gotika lumkolono el 1831 kaj la granda abateja preĝejo. Origine ĝi estis „baziliko“, kiu post forbrulado estis novkonstruita kun fasadoturoj, ne finkonstruitaj.

En la preĝejo, kiu nunjare okaze de la 800-jara ekzistjubileo fariĝis laŭ papa edikto „Katedralo“, troviĝas mondfamaj artotrezoroj: la stukaĵoj de Dominik Piazzol, la freskoj de Greiner, la bildoj sur la predika pupitro kaj la altaroj de Peter Strudl kaj Antonio Belucci; la ĉefaltaro kaj la pastrejo novkonstruita de Donato de Allio kun stukaĵoj de Santino Busi kaj la belega plafonfreskaĵo de Rottmayr. La ĉefaltarbildo de Kuppelwieser.

La plej valora juvelo de Klosterneuburg estas la mondfama „Verdun-a altaro“, pri kiu sekvos aparta artikoleto.

En la monaĥejo la plej bela estas la „Imperiestraj ĉambroj“, kiujn oni devas detale priskribi alifoje.

Eksterordinare grandan valoron reprezentas la kolektoj de la abatejo (trezorejo, muzeo, biblioteko).

En la fama abateja vinkelo kun bonegaj vinoj estas la fama „Giganta barelo“, de kiu la Wien-anoj okaze de la Festo de Sa. Leopold la 15. nov. malsuprenglitas pro plezuro kaj en granda societo.

Richard Kreutel.

Esperanto-Varbad-Servo por Aŭstrio.

Dum aro da jaroj la subskribinto varbis por Aŭstrio pere de Esperanto. Li instigis kaj tradukis la ĉiujarajn gvidilojn de Ministerio por Komerco kaj Trafiko, Fremduloficejo de Urbo Wien, Foiro de Wien kaj iniciatis ankaŭ ĉe fremdulvarboficejoj de Liglandoj kaj Urboj en Aŭstrio aldonadon de propagandiloj en Esperanto. Dum pluraj grandaj vojaĝoj li varbis en Radio, film- kaj lumbild-paroladoj en 12 landoj por Aŭstrio, aperigis intervjuojn en la gazetaroj de ĉi tiuj landoj pri Aŭstrio, enkondukis la varbo-paroladojn ĉe Radio-Wien. Ankaŭ la nunjara kongreso en Wien multon varbis por nia patrolando.

Nun mi fondis en la kadro de Aŭstria Esperantisto sub la titolo „Esperanto-Werbedienst für Oesterreich“ (EWOe) (E.-Varbad-Servo por Aŭstrio [EVSA]) okaze de la 25-a datreveno de mia esperantistiĝo jenan instancon, kiu kun subteno de la plej altaj instancoj en nia ŝtato zorgu venonte por la propagando por nia ŝtato pere de Esperanto.

Kunlaboro kaj konsiloj estos volonte akceptataj.

Samideane Hugo Steiner.

„Aŭstria Esperantisto“, la oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, estos eldonata ekde januaro en amplekso de 10 paĝoj (8 en E. kaj 2 „Die Zweite Sprache für Alle“) sen altigo de la prezo.

Senatano Abbott faris en Aŭstralia Senato la proponon, iniciati la instruadon de unu komuna lingvo en ĉiuj lernejoj de la mondo, kaj la Senato voĉdonis por ĝi per 19 kontraŭ 5 voĉoj. — Grandioza sukceso! Esperanto marŝas kaj IEL „kuraĝe antaŭe“!

Scherer — vojaĝo — restado en Aŭstrio.

La dua semajno en februaro estas rezervita por paroladoj de Scherer en Aŭstrio. Ni en Wien aranĝos paroladojn kaj ni petas, ke la grupoj ekster Wien ĝis fino de decembro anoncu al ni, ĉu ili estas pretaj aranĝi Scherer-paroladojn. Plej bone estus, se oni povus aranĝi la paroladojn en germana lingvo pere de Urania aŭ simila instituto.



En la mezo Scherer kun du eminentaj filmindustriistoj en Hollywood.

La kostoj de la restado estas potage proksimume 45 S plus la elspezoj por loĝi kaj manĝado, se ne s-ano lin gastigos. Scherer estas tre modesta homo. La prezo estas tial iomete alta laŭ niaj ideoj, ĉar en la prezo estas enkalkulata kompreneble ankaŭ la vojaĝo en nia lando kaj parto el la vojaĝkostoj al Eŭropo kaj returnen al Ameriko.

Vi elektu el jenaj paroladoj:

1. **la hejma vivo en naŭ landoj de Azio**
2. **„romantika Hollywood“ (nova parolado)**
3. **„Tra Usono kun ruliĝanta hejmo“** (sensacie interesa).

En tiuj lokoj, kie oni aranĝas lumbildparoladojn de Scherer, li senpage faros paroladon por la koncerna grupo.

Scherer jam nun parolis antaŭ pli ol 300.000 personoj kaj al nekalkulebla nombro de Radio-aŭskultantoj.

Certe ankaŭ estos eble aranĝi prelegojn en germana lingvo en lernejoj.

„Esperanto en la moderna vivo.“

Internacia Konferenco

Paris 14.—17. majo 1937.

„E. en la moderna vivo“ montros kun siaj 4 komisionoj, ke E. funkcias kiel praktika ilo por ĉiuspecaj internaciaj rilatoj kaj ke senkonkurence E. estas la sola internacia lingvo vivanta apud la vivantaj lingvoj de la diversaj popoloj.

Jen la gvidideo de la Konferenco!

Prezidanto: André Baudet

Viceprez.: Ernest Archdeacon, prez. de SEPE

Generalo L. Bastien, prez. de IEL

Jean Couteaux, ĝen. sekr. de SEPE

Ĝen. Sekr.: Pierre Petit, konst. sekr. de SEPE

Ĝen. Kas.: C. Rousseau

Adreso: S-ro P. Petit, ĝen. sekretario, 59 Rue de Neuilly, Rosny-sous Bois (Seine).

Kotizo: 100 fr. fr. kun 20% rabato por la ĝis 15. februaro pagantoj. Kontraŭ tiu malalta kotizo vi ricevos: Kongresinsignon, 6-monata abono de la oficiala konferencgazeto, ĉiujn dokumentojn de la konferenco, 40% rabaton sur la fervojoj francaj, senpagan enirrajton en la Ekspozicion dum 6 tagoj, senpagan partoprenon al ĉiuj solenaĵoj kaj al la teatra vespero; senpagan karton por la granda oficiala festeno de la Konferenco.

Aliĝu tuj!

Aŭstria Antologio.

Mi kompilas nun en kontakto kun la kompetentaj verkistaj asocioj.

Aŭstrian Antologion de la 20-a jarcento. Ĝi aperos en **6 partoj** po 64 pagoj (23×14 cm) en bona preso sur bela papero kaj traktos nur pri la aŭstriaj verkistoj, kiuj vivis kaj vivas en la 20-a jarcento.

Per la Antologio vi pli intime konatiĝos kun la aŭstriaj verkistoj, jam famaj kaj altesperigaj.

La libroj aperos en februaro, aprilo, junio, aŭgusto, oktobro kaj decembro.

La prezo po libro estas S 2.10 plus afranko 30 g. Kiu antaŭmendas kaj pagas ĉiujn 6 kune, ricevos kun la lasta libro belan kovrilon por la tuta verko senpage.

Mendoj ĝis **plej malfrue 31. de januaro 1937,** por la 1-a volumo kaj ĉiuj 6 volumoj; poste plialtigo je 15%.

Tia moderna Antologio ĝis nun ne aperis en alia lando.

La kompilanto: Steiner, Wien, I., Neue Burg.

28. Univ. Kongreso de Esp.

Belfast. Mi sentas la devon por danki al vi pro la neforgeseblaj tagoj mi pasis en Aŭstrio antaŭ, dum kaj post la kongreso. Neniam en la daŭro de mia vivo mi ĝuis tiel ferion ĝojplenan kaj feliĉan. Kiam mi pensas pri la terura laboro, necesa por la sukceso de la kongreso, mi sentas, ke oni ne povas sufiĉe danki al vi kaj viaj kunlaborintoj. Emma Arnold.

Universala E.-Asocio, Genève, eldonis en novembro numeron de „Esperanto“, en kiu provizora komitato priparolas la nunan situacion laŭ sia vidpunkto.

Esperanta Radia Bulteno, Leningrad, USSR., dissendas ĉiam dumonatan programon de la dissendoj. En decembro 13 dissendoj.

Radio.

Wien: E.-kurso ĉiun **lundon** de 15 h 40 — 16 h.

11. dec. Richard Kreutel pri „Pro ski-sporto al Aŭstrio.

18. dec. prof. d-ro H. Sirk pri „Ne sufiĉe konataj kolektoj en Wien“, je 22 h 20.

8 januaro prof. d-rino Brunhilde Flasch „Famaj aŭstria virinoj“, proks. je la sama tempo.

M.-Ostrava: 15., 22. kaj 29. dec. ĉiam de 18 h — 18 h 10.

Brno, Praha, M.-Ostrava: 22 h 15 — 23 h **„Esperanta Horeto“** — „Pacon kaj ĝojon al homoj de bona volo.“

Estis koro . . .

„Estis amoplena koro,
Tre malgranda, tre varmega,
Kiu gaje al mi donis
Ĉion ravan enhavitan:

Kaŝajn vortojn, manpremegon,
Rubandetojn orbroditajn,
Bonodorajn ruĝrozetojn,
Kaj kanteton, fajre ardan;
Tricent kisojn kaj mil larmojn...“
„Larmojn?“ — „Jes — pro adiaŭo.—

Fine etan ŝlosileton —
Oran kun arĝentornamoj —
Metis antaŭ miajn piedojn. —

Kaj mi ridis de altsupre...“
„Ridis?“ — „Jes —
Sed kortuŝita do senvole:
Estis ja la tut' trezoro
El la amoplena koro...“

Adolfine Felzmann.

Gardu naturon!

La arbo ne estas senanima objekto, sed sekreta, saĝodona estaĵo, gvidanta la homon al regno de senfina ĉarmo.

(Em. Bronec.)

„Aŭstria Esperantisto“, la organo por „Esperanto-Varbad-Servo por Aŭstrio“, akceptas volonte bonajn, interesajn, koncizajn artikolojn kun fotoj, krome poemojn ktp. Viaj verkoj poste estos legataj en la tuta mondo.

Jolán Földes.

Tre interesa intervjuon havis s-ano Bleier, Budapest kun Jolán Földes, la gajninto en la romankonkurso, aranĝita la unuan fojon de la agentejo Pinker en London kun partopreno de 14 grandaj libroeldonejoj en same tiom da ŝtatoj, kun premio de 4000 funtoj sterlingaj.

Ŝia romano „Strato de la fiŝkaptanta ĥato“ nun elvenos verŝajne en februaro 1937 ĉe Literatura Mondo samtempe kun la alilingvaj eldonoj.

Al tiu intenco de L. M. la verkistino diris: „Mi tre ĝojus pri ĝi, ĉar ja per E. miaj vortoj venus ankaŭ en lokojn, kien per aliaj lingvoj ili ne povus iri, aŭ almenaŭ tre malfacile.“

Valentinov Mikaelo †

54-jara, esperantisto de 1906, fondinto de multaj rondetoj kaj kursoj, la 21. X. Malĝojigitaj malnovaj esp-istoj entombigis lian korpon, sed lia ideo, lia memoro restos vivema. Dormu trankvile nia amiko.

Lia instruisto Alexander Prager, Moskvo, esp-isto de 1897.

El la mondo.

Esperanto-kalendaro. J. Philip Kruseman, 's-Gravenhage, Nassauplein 1 B, Nederl. eldonis kalendaron kun deŝireblaj folioj, kiuj estas provizitaj kun belegaj grandaj bildoj el la Esperanto-vivo. Prezo ned. guld. 1.55 kun sendkostoj. Bela donaco por kristnasko.

Novaj gvidiloj:

Ĉeĥoslovakio, Grotoj de la Klubo de ĉeĥoslovakaj turistoj Domica, Jasov kaj Bielská, 4 pĝ. faldprospekto kun multaj belaj bildoj. Senpage ĉe: Klub čs. turistu, Praha.

Ĝenova kaj ĝia Riviera Bordaro, gvidlibreto, 16 paĝ., grandformata, kun multaj bildoj kaj plano, eld. de „Associazione per lo sviluppo del Turismo Ligure“, Via Garibaldi 2, Genova.

Argentinio. Fervoj-kaj Radio-inĝ. Hugo J. Ceretti (9. de julio 3301) Rosario (St. Fe) deziras artikolojn pri intelektaj temoj por eldonota hispana gazeto.

Belgujo. Esp-ista Reprezentantaro Bruselo, fondita antaŭ jaro, eldonis sian unuan eldonaĵon: **Marista Rakonto,** kanto kun piano, aŭ angla kanto, teksto reverkita de F. W. Buenting. Prezo de la muzikaĵo 3 belg. fr. Adr.: Bruselo, 77 Nieuwenhovestrato.

Ĉeĥoslovakio. E.-ŝlosiloj en ĉeĥa lingvo (6. eld.) kaj en slovaka (2. eld.) eldonis E-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, po 32 paĝoj krom kovrilo sur bonega papero, tre bela preso, po 1 Kĉ aŭ 2 ekz. por 1 resp. kup.

Finnlando. E.-soc. de Uusikaupunki eldonis 4-paĝan varbilon kun aro da bildoj en 3 koloroj. Krome varbilojn en finna lingvo pri E. — Mendu senpage.

Hispanujo. Valencia. „Popolo Fronto“, duonmonata E.-gazeto, „informa bulteno internacia pri hispana lukto kontraŭ la faŝismo.“ 1. nro nov. 1936.

Ljubljana, Jugoslavio. 12-paĝa faldprospekto kun urboplano kaj multaj belaj bildoj.

Spritaĵo.

„Kie vi manĝas en la gastejo? Kie estas via edzino?“

„Ŝi parolas en Radio pri kuirreceptoj.“

Brazila Registaro

tre simpatia al Esperanto.

9-a Brazila Kongreso de Esperanto en Palaco de Ministerio por Ekstero.

Oficiala poŝtmarko por memorigi la E.-Kongreson.

Prof. d-ro Bujwid gasto de la kongreso.

Jubileo Andreo Cseh.



Tiu ĉi senlaca laboranto por antaŭenpuŝi nian movadon nun festos la 25-an datrevenon de sia esperantiĝo.

Andreo Cseh plirigigis nian anaron je miloj da novaj adeptoj. Centoj da instruistoj en la tuta mondo instruas laŭ lia metodo.

Haga grupo „Fine ĝi venkos“ festos sian 30-jaran jubileon la 20-an dec. kaj oni intencas tie samvespere festi la jubileon de Cseh kaj transdoni al li memoraĵon.

Ni invitas la esperantistojn partopreni en ĉi tiu festo persone aŭ letere. Adreso f-ino C. E. van Voorthuijsen, Nordeindsplein 2-a, Leiden, Ned.

Kiu deziras partopreni en la donaco, sendu sian kontribuon al la sama adreso antaŭ la 15. dec.

La jubilea Komitato.

IEMW, AEA, AE kaj mi persone sincere aldonas plej korajn bondezirojn!

Steiner.

La 15. de decembro

Librotago

okaze de la naskiĝtago de Zamenhof. Aĉetu librojn ĉiu almenaŭ unu! Grandan stokon je libroj havas Librovendejo s-ano Rud. Foltanek, Wien, I., Herrengasse 2.

Novaperis jenaj libroj:

„Antaŭaj cirkonstancoj“, burleskaĵo de Nestroy, 60 g.

„E-ŝlosilo“, 4. eldono.

„Kleines Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto“, po 5 ekz. 50 g.

„XI. Somera Universitato“, 20 tre interesaj prelegoj, bele bindita, S 2.70.

„Albumo de Wien“, bele bindita, kun pli ol 100 bildoj kun E.-teksto klariga, S 2.70.

„Tra Aŭstrio“, vojaĝlibro tra la plej belaj partoj de Aŭstrio, 80 paĝa, S 1.70.

Ĉiujn librojn peras nur kontraŭ antaŭpago Aŭstria Esperantisto, Wien, I., Neue Burg.

Antaŭaj cirkonstancoj

de Johann Nestroy
Esp.-igis Hugo Steiner.
La kantojn trad Alois Norbert.

Kvina sceno.

Muffl sola.

Ja vivas bonuloj sur tuta la mond'
Sed ilin kanajloj delogas sen hont'.
Vendejon mi havis, kaj monon en man';
Prezentis al mi sin sed kompanian'.
Kun li mi kontraktis, akceptis mi lin,
Sed venis per li la negoca ruin',
Ne estis jam kaŭzo por tim' kaj terur',
Sed li do sin savis per simpla forkur',
Kaj prenis la reston de l' mon' li kun si — —
Bonuloj, kanajloj do jen inter ni!
Virinon mi vidis, ekardis la am';
Si estis pli bona ja ol sia fam';
Mi pensis: „Ho ke do ŝi amu nur min,
Mi certe ja seriozigos tuj ŝin.“ — — —
Mensogis du viroj al ŝi laŭ bezon',
Kaj unu eĉ diris: „Mi estas baron'.“
Kaj fakte sukcesis do trompi li ŝin,
Si sekvis al li kaj forlasis do min.
Ja certe centfoje ĝin pentis jam ŝi — — —
Bonuloj, kanajloj do jen inter ni!

(Li parolas): Same ankaŭ mi estis viktimo de amikeco kaj amo. Mia bonega vendejo de drogoj en ĉi tiu industria epoko ne povis malsukcesi pro unu sola posedanto; mi akceptis kunsocietanon kaj la bankroto per tio estis ebligata. Laŭ kutimo de bankrotisto mi savis por mi rezervaĵon de dekmil guldenoj por malbonaj tempoj, sed tamen la afero tiel tuŝis min, ke mi devis uzi bankurac-metodon; kompreneble ne tian en tre renomata banloko, ĉar tio estus surpriza ĉe ĵus duone bankrotinto, sed mi veturis al banloko, ne ankoraŭ fama; ili nun trovis, ke la kubikmetro de ilia akvo enhavas unu kaj duonan gramojn da jodkalio, dudek-naŭ-onan hektolitron da karbona natrio kaj kvar kaj tri okonajn miligramojn da sulfursublimato, sekve preferinda al ĉiuj aliaj banlokoj, je kiuj la kalkiga fermento pli aŭ malpli estas neŭtraligita kaj per tio evidente la kuracpovo estas malgrandigita je sep kaj tri dekses-onaj procentoj. Kiu dubas pri tio, povas fari siajn proprajn analizojn. Tien mi veturis kaj estis surprizata; ĉio ja estis malbona, sed multekosta kiel en la plej famaj kuraclokoj. Ankaŭ por amuzado estis zorgita; la teatro estis malgranda, artistoj ne estis, estis nur ludantoj, por ke la vespero pasu drame kaj por ke oni iru iom senkuraĝigite kaj kun pli malgrandaj postuloj en la gastejon. Jen venas subite malfruiĝinta unuaranga „stelino“ al la aktoraro kiel kulminacio de la migranta entrepreno. Tuj post ŝia debuto mi kuraĝe faris al mi la vojon al ŝi; ne estis facile jam pro ŝia artistfiero, ŝi imagis ankoraŭ pli multe ol ŝi rajtis... kiel ili jam estas, tiuj

„Aŭstria Esperantisto“ ne nur raportos pri la E.-movado tutmonda, sed ankaŭ estos la plej disvastigita gazeto „pri literaturo, belaj artoj, amuzo ktp.“ de Aŭstrio.

Vizitu en Vieno la unuan **„Tischgrill-Restoracion zum Kühfuss“**, Wien, I. Graben 20 (I. Naglergasse 1), kie vi mem povas rostigi vian viandon elektre sur via manĝotablo.

...noj. Ŝia dua rolo estis la Pompadour; Nereis ĉie estas ludata, do jam multaj ludis ĉi tiun rolon, sed tiel! Ne! Unuvorte, la sekvintan tagon mi falegis antaŭ ŝiajn piedojn kun la elvoko: „Ne superebla“. Ŝi donis al mi pli ol true bonŝancojn, ĉar koketa ŝi estis — — kiel ili jam estas la plej multaj. Ni estis geamikoj, post kelkaj tagoj gefianĉoj — — sed sen sukceso; ĉar baldaŭ poste tre riĉaj eksterlandanoj venis en la banlokon, ĉiu el ili studinta riĉegulo, kaj jen — — kiel ili jam estas la plej multaj — — ŝi fariĝis malfidela al mi. Kun la restaĵoj de mia kapitalo mi poste fariĝis vin-vojaĝisto, nome mi veturvagadis sen ripozo kaj en mia malespero mi nur trinkis vinon. Suldaresto, senloĝejeco, plena morala pereo estis la ĉarma skalo malsupren. Ho estas amara sentado, se oni ofte estas tiel malsata, ke oni pro soifo ne scias, kie oni dormu dum la nokto! Mi tion travivis, jen venis al mi la ideo, fariĝi domservisto; tio vere ne estas bela ideo, sed la realeco estas ankoraŭ pli sovaĝa. Tiel mi estis sklavo ĉe du mastroj; jen la tria provo, kiun mi faras kiel hela negro. (Li rigardas dekstren.) Venas iu — — ha mia estonta mastro.

Sesa sceno.

Scheitermann, **Muffl** al lia maldekstro.

Muffl (renkonten al li). Humila servisto via.

Sch. Kion vi deziras?

Muffl. Mi. Vi havas ĉion, kion via koro sopiras, nur ne domserviston.

Sch (al si, lin ekzamenante rapide). Kurioza homo! (Al Muffl.) Ĉu oni lin sendis al mi de la servistkontoro?

Muffl (elpoŝigante slipeton). La domnumero estas ĝusta, dua etaĝo — — nomo ne estas sur ĝi — —

Sch. Tute ĝuste, mi jam estas tiu. Ĉu li havas siajn atestojn — —? (Li rigardas lin pli precize.) Je ĉielo — —! (Preskaŭ senvorte pro embaraso.) Kruci — — kruci — —!

Muffl. Na? Kion faris al vi la turkoj, ke la vorto restas en via kolo? (Li lin rigardas precize kaj reiras kun duonsubpremata ekkrio.) Ha — —!

Sch. kaj Muffl. (Samtempe, sed ĉiu al si.) Tiu ja estas — —!

Muffl (al si). Johano, mia iama domservisto — —

Sch. (al si). Muffl, mia iama mastro — —

Muffl (mirante, al si). Tiu estas supre!

Sch. (mirante, al si). Tiu estas vere malsupre! (Li igas rapide supren la ĵaketkolumon, por iomete kaŝi sian vizaĝon.) Min trafas apopleksio!

Muffl (ĉirkaŭiras lin al lia dekstra flanko; tute proksima al li). Bubaĉo, ĉu ci ne konas min plu?

Sch. (en plej granda embaraso). Vi ŝajnas esti en eraro — — mi ne estas tiu, kiun vi ŝajne supozas.

Muffl. Ne hipokritu, alie mi helpos cin el cia revo!

Sch. (kun streĉo elrektiĝante kaj kuraĝigante sin). Sinjoro, mi urĝe petas vin foriri.

M. Mi do konas mian iaman domserviston! (Li daŭrigas minactone.) Neniuj stultaĵoj, Johann, alie...

Sch. (al si). Jen nenio helpas, mi devas cedi. (Laŭte al Muffl.) Nu jes, estas mi, sed... pro ĉio en la mondo... ke nur neniu persono...

M. Do vere! Li riĉiĝis tiu bubo! Tio estas tro multe! Kaj mi estas malriĉa kiel almozpetanto... jen oni ankaŭ povas diri... „Despli granda...“

Sch. (timeme). Mi petas vin, sinjoro Muffl, ne kriu tiom; se mia edzino tion aŭdus, mi certe mortus! (Li rigardas maldekstren.)

M. Edzinon ci havas? Kaj ci timas ŝin? Tio iomete min repacigas kun mia sorto. Ci do ankaŭ havas ciajn zorgojn.

Sch. Vi denove eraras; ŝi estas ankoraŭ juna, bela virino.

M. Kaj ci estas ŝia edzo... bedaŭrindulo, nun mi jam havas kompaton kun ci.

Sch. Edzino el vere bona familio, profesorfilino. Ŝi ne konas mian antaŭan vivon, mi prezentis min kiel filon de domposedanto, a ie mi ŝin ne estus ricevinta kiel edzinon.

M. Do domposedaĵon ci devis preteksti? Ha, ekzistas egoistaj homoj, speciale inter la inoj.

Sch. Ĉesu, vi ofendas mian edzinon.

M. Ci ankoraŭ estas same stulta kiel ci estis.

Sch. (ofendite). Entute vi parolas en tono... (Li preterpasas lin dekstren.)

M. La malfeliĉo min tiom malbonhumorigis, ke mi ĉiam diras la veron. Flataĵon ci ne bezonas timi flanke de mi.

Sch. Vi do vere ruiniĝis ĝis domservisto?

M. Tio do nun ne plu havas la preman senton, ĉar mi nun fariĝas cia domservisto.

Sch. Vi, mia domservisto...?

M. Nu, ci do ne lasos cian iaman mastron kiel vaganton?

Sch. Vi, mia... ne, vi, tio ne eblas.

M. Kial ne? Ĉio eblas!

Sch. Mi neniam povus esti ĝuste tiel bruta kontraŭ vi.

M. Mi ne malpermesis al ci la afablecon.

Sch. La iama respekto farus ĝin maleble, ke mi lasus purigi miajn botojn de vi.

M. Mi ne estas ĵaluza je tiu laboro; ci povas purigi ilin de kiu ci deziras.

Sch. Krome mi ne povas preni homon en mian hejmon, kiu jam plurfoje min atakis kaj batis.

M. Jes, ĝuste! Mi cin pli ofte batis sufiĉe... mi ne estas nepacigebla kaj tion jam longe forgesis.

Sch. Sed ne mi; ĉiam restas certa remenoro..

M. Ke ci venis hejmen ĉiun dimanĉon en ebria stato, ci senbrida bubo!

Sch. Per unu vorto, nepre ne estas eble.

M. Ci fia parvenuo. Cian mastron de iam ci volus elpuŝi senlabora? Ha, kiaj malbonaj homoj ekzistas, precipe inter la iamaj domservistoj! Maldanka favorito de l' ĉielo! Ĉu ci forgesis, ke mi ĉiam estis via bonkora mastro? Ke mi ĉiam rigardis tra la fingroj, kiam ci estis ŝtelinta?

Sch. Nenia kalumnio!

M. Ci nenian ŝtelis valoraĵojn, tio estas vera. Ci nur forgesis ĉiun momenton, redoni guldenbankbileton; poste ci ree perdis kelkajn „Sechserln“, poste oni al ci ne bone sanĝis la monon aŭ ci disĵetis monerojn... unuvorte ci estis malgranda fripono, sed kune tio ja sumiĝas.

Sch. (kolere, montrante al la meza pordo). Tuj eliru!

M. Bone mi foriras, sed mi rakontos al la urbanaro kiel oni fariĝas lignovendisto. (Turnas sin por foriro.)

Sch. (volas lin timeme reteni). Haltu! Restu!

M. Kial? La loĝantaro sciiĝu, ke ci servis al mi dum tri jaroj... se ankaŭ ne ĉiam fidele kaj honeste... sed tamen servis; ke ci poste ĉe bankisto Reichenbach...

Sch. (Timeme premtenante lin). Vi do ne faros tiun malagrablaĵon al mi? Se mia edzino... estus terure... se ŝi, kiu estas el tiel nobla familio... (tre afable). Vi fariĝu mia domservisto, se vi ĝin nepre deziras, sed vi ĵuru, ke vi neniun vorteto...

M. Ci estas timulo...

Sch. (kolere). Ne parolu plu...

M. Klopodu nur, ke ci ĉiam akiru mian kontentecon kaj ci nenion bezonas timi, ĉar nur dum mia kolero aŭ melankolio mi ĉion rompklaĉas...

Sch. (malespere al si). Li estas diablobubo... (Li preteriras lin maldekstren.)

M. Kaj kio estas pri mia salajro? Kion mi ricevos?

Sch. (iom timeme). Domservisto ricevas ĉe mi po monato ok guldenojn kaj la nutradon.

M. Ci ricevis ĉe mi dek guldenojn; ĉu ebla mi malpli valoras? Kio ci estas, ankaŭ mi estas, ci fi-ŝparulo, ci!

Sch. (kolere). Tion mi malpermesas! Vi evoluigas impertinentecon...

M. Ĉu nur evoluigi? Mia impertinenteco datumas jam delonge, kiel cia iama mastro mi havas la rajton esti impertinenta kontraŭ ci.

Sch. (denove kvietigante). Sed vi tamen devas kompreni, ke la nunaj cirkonstancoj...

M. Mi entute ne bezonas komprenon. Cetere, dek guldenojn monata salajro kaj unu guldenoa potage por nutrado. Nun ni estas en interkonsento.

Sch. Kial nutrad-pagon? Miaj servistoj ricevas ĉion en mia hejmo...

M. Tio ne eblas ĉe mi. Mi devus vidi surtabligi kaj ne volas scii, kiel ci manĝegas dume mi nur ricevas supon, bovaĵojn kaj legomon — — — tio ekscitas sentojn, de kies sekvoj mi deziras cin gardi. Unu guldenon ci tuj povas antaŭpagi.

Sch. Unu guldenon? (Li prenas sian monujon.) Mi nur havas dekguldenajn bankbiletojn...

M. Nu, do donu unu, ci ja povas noti tion.

Sch. Jes, vi pravas... (Li donas al li bankbileton.)

M. (ĝin enpoŝigante). Bone... sed atentu! Mi bezonus ankoraŭ diversan... donu ankoraŭ unu dekguldenon! (Li senĝene donas sian monujon en la manon de Sch., kiun tiu ankoraŭ havas malfermite, kaj prenas el ĝi.)

Sch. (konfuzite). Sed vi prenas tute laŭvole...

M. Ĉu ci pensas, ke mi prenas tro multe de ci? Suspektemulo! Jen, reprenu la duan dekguldenon, konservu ĝin! (Li redonas ĝin.) Ci ja tamen devos doni, kion mi volas, alie estus malbone pri mia diskreteco, tion ci neniam devos forgesi.

Sch. (al si). Tiu fripono estos mia morto! (Laŭte.) Kaj kara Muffl ne ĉiam diru al mi „ci“.

M. Tio ja nur estas inter ni, ci stultulo! Sed ci volis foriri, kial ci tiom longe staras ĉi tie?

Sch. Mi nur volis diri al vi, se vi hazarde renkontos mian edzinon, nur parolu ege ĝentile kaj humile, ĉar ŝiaj nervoj apartenas al la nobla medio, kaj vi ne havas imagon, kiajn ege subtilajn nervojn ŝi havas.

M. Nu bone, jam foriru!

Sch. (al si). Terura fi-ulo! (Li eliras malespere tra la mezo.) Daŭrigota.

Deziras korespondi:

Jugoslavio. Prof. Franc Novljan, Nova Gradiŝka, por siaj 12—17 jaraj gegimnazianoj.

U. R. S. S. Moskvo, Centro, Box 80. A. Prager, amatoro-florĝardenisto, pri edukado de multjaraj floroj: georginoj, pionoj ktp., interŝanĝas per fotoj, desegnaĵoj de floroj ktp.

„Aŭstria Esperantisto“ ebligas al vi, ĉar ĝi eliras al 60 landoj, korespondadon kaj interŝanĝon kun la tuta mondo. Anonco 2-linia S 2·—, ĉiu plura linio S 1·—, antaŭpagota.

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist"

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des Oesterreichischen Esperanto-Bundes

Nr. 15 Dezember 1930

Für Oesterreich jährlich mit Postzusendung, nur zu fünf Stück, S 2.50 in Briefmarken. — Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-12.826

Radio-Kurs.

„... nun wünsche ich noch dem von Ihnen geleiteten Kursus recht großen Erfolg, möchten nur recht viele Menschen es lernen und diesen großen, herrlichen Gedanken einer wahrhaften Menschen- und Völkerverbrüderung in sich aufnehmen, denn diese Sprache ist wirklich das Symbol einer neuen und besseren Zeit der Menschheitsgeschichte, einer Zeit, nach der sich alle Menschenherzen sehnen."

Ein Radiohörer aus Deutschland.

Schriftlicher Esperanto-Kurs.

Die Generaldirektionen für Eisenbahnen und Post haben ihre Bediensteten darauf hingewiesen, an einem schriftlichen Esperanto-Kurs teilzunehmen, der vom Präsidenten des Oesterr. Esperanto-Bundes geleitet wird. Der Kurs besteht aus 30 Wochenbriefen und kostet insgesamt S 3.60.

Es nehmen daran teil 60 Personen aus mehr als 50 Orten Oesterreichs, wo noch keine Esperantisten sind. Dadurch werden neue Zellen geschaffen.

Interessieren Sie Ihre Bekannten! Der Kurs kann jede Woche beginnen, allwöchentlich 1 Brief.

Anmeldungen an Hofrat Steiner, Wien, I., Neue Burg.

El la grupvivo de AEA

Bizau, Vorarlberg. Kurso gvid. de Erna Fabjan.

Graz. E.-Verein f. Steiermark. La 12 dec. okazos en Graz, Bürgerg. 4 (societa hejmo) la ĝeneralkunveno de la Asocio kaj la grupo Graz. Komenco je 20 h.

Leoben. Grupo de AEA ekfondiĝas. S-ano Laukes multe varbas kaj nun gvidas kurson. Urbestro Georg Koch disponigis belan ĉambron en la urbdomo por ĉi tiu celo. Koran dankon! 20 s-anoj nun estas en ĉi tiu malgranda loko, parto el ili estas el la restadtempo de s-ano dir. Neumayr, nun en Tamsweg. — Ĉe la ponto en la ĉefstrato E.-varbtabulo kun ĉiam varia materialo atentigas la preterpasantojn kaj la traveturantajn aŭtomobilistojn pri E. — Al ĉiuj loĝpartioj en la loko varbmaterialo pri E. sendita per poŝto. En kinoteatro du diapozitivo montris E.-varbotekston.

Melk. Gojigaj sciigoj. Nia vigla s-ano Ehrenreich, gastejestro Hotel Bahnhof sendas jenajn por la historio de la jus fondita grupo de AEA „Esperanto-klub Melk" gravajn informojn: 21. aŭg. 1936 vizito de familioj Zamenhof kaj Steiner. 21 okt. 1936 klubfondo, 21. nov. 1936 tridek membroj de la nova klubo aliĝis al AEA. — Kurson gvidis s-ano Lachmann el St. Pölten. Dankon al s-ro Lachmann, gratulon al s-ano Ehrenreich.

Rodaun ĉe Wien. Ĉefadministranto e. p. gvidas kurson.

Spittal a. d. Drau. Dum la restado en tiu ĉarma urbeto antaŭ la veturado al sur Grossglockner s-ano Blaschke kun kelkaj novuloj atendis la karavanon, salutis ĝin, gvidis unuopajn s-anojn je rigardo de la urbeto kaj aĉeto de rememorajoj.

Spittal a. d. Drau. S-ano Blaschke nun gvidas kurson.

Steinakirchen. E.-kurso sub gvidado de instr. Hans Zant. Grupo de AEA fondota. Dua kurso komencota. Granda intereso ĉe la instruistaro. S-ano Pflügl multe varbis.

Steyr. La E.-rondo kunvenas ĉiun merkredon je la 20 h en gastejo Weinhäupl, Grünmarkt 3.

Waidhofen a. d. Th.: Funkcias po 1 kurso por komencantoj kaj progresintoj, laŭ lernolibro „Freude durch Esperanto". Post kvin lecionoj la gekursanoj montras bonan progreson. Grupo fondota post Novjaro. Gvid. Pizl.

Wien. E.-kurso de AEA kun 25 personoj en la 1. distrikto.

Wien. Esperanto-Klub hat ab 15. Dezember seine Vereinsabende jeden Dienstag (18.30 bis 19.30 Uhr, kostenlose Teilnahme; dann folgendes Programm: Vorträge, Berichte über Organisation und Neuigkeiten aus der Bewegung, Gesang) I., Wallnerstraße 6 (Briefmarkensammlerverein, rechts im Haustor!). Gäste gerne gesehen. Der Klub zählt derzeit 91 Mitglieder. Am 29. Dezember **lustiger Abend.**

Wien. E.-kurso ĉe „Buchkaufmannschaft“ (komerca oficistaro) E.-kurso.

Wien. Kurso en Kaufm. Wirtschaftsschule Schremmer. Gvid. reg. kons. Stengel.

Wien. E.-soc. Danubio: 7. 12. Juli Tojoda spricht über das japanische Volk und seine Musik; 14. 12. Zamenhof-Gedenkzusammenkunft: Franz Vasta hält Lichtbildervortrag über das Leben unseres Meisters; 21. 12. Präs. Cech: Esperanto-Zeitungsschau, „Aktuelles aus Esperanto“; 28. 12. Lustige Vorsilvester-Zusammenkunft.

Organizo.

„Terura vorto“ oni aŭdas diri, ĉar dum la lastaj jaroj sufiĉa laboro sur ĉi tiu kampo estis necesa, farita kaj tamen ne sufiĉis!

Nun post fondo de IEL, estiĝis vetkurado de opinioj, ĉu per gazetoj ĉu cirkuleroj!

Certe necesas paco, harmonia kaj sukcesplena laboro kaj — nur tion sopiras la plejmulto de niaj samideanoj.

Sukcesplene labori nur povas organizo, en kiu regas disciplino, ne kadavra disciplino, sed tamen tiom da memdisciplino, ke la s-anoj fidu al la elektitaj estraro kaj komitato kaj subtenu ilin sen multe demandi. La estraro nur deziras plifortigon de la movado kaj la atingon de la necesa fincelo: sufiĉa rekono de Esperanto flanke de la registaroj per enkonduko de Esp. en la lernejojn.

Al ĉi tiu grava celo helpu la Konferenco, kiu okazos dum Pasko en Parizo, kaj jam pro tio ĉiu havas la devon, subteni IEL!

Sed ankaŭ en la unuopaj landoj regu paco inter la esperantistoj!

Estas afero de memdisciplino kaj de sufiĉa priresponda konscio kaj laŭ la ofte misuzata „interna ideo“, ke ĉiu esperantisto aliĝu al la Landa Organizo, reprezentanto de IEL, por per tio helpi al la movado. Fondo de apartaj grupoj, organizoj ktp. estas ne nur nenecesa sed danĝera kaj malhelpa, malkonstrua kaj plejofte nur farita pro personaj aferoj.

Nia enlanda movado Aŭstria E.-Asocio en ĉi tiu jaro faris grandiozan laboron, nur superatan en malmultaj landoj. Legu pri tio la numerojn de AE el 1936.

AEA havas antaŭ si gravan laboron, nome helpi al la Konferenco Paska en Paris.

AEA, **„La aŭstria E.-movado“**, plenumos sian devon kaj ni petas, ke ĉiu aŭstria esperantisto konsciiĝu, ke ankaŭ li havas devon — helpi al la movado per aliĝo al — AEA!

AEA devas esti kontenta pri la subteno kaj rekono kiel „La“ landa organizo de Aŭstrio, flanke de la registaro kaj de ĉiuj oficialaj instancoj (ministerioj, landaj registaroj, fervojo, poŝto, fremdulfrekvent-oficejoj, foiro ktp.) kaj pri la kresko de sia membraro.

Ni esperu, ke dum 1937 ĉiuj aŭstriaj esp-istoj trovos la vojon al la organizo — AEA-IEL.

IEL (nuna adreso en la propra domo Heronsgate, Rickmansworth [Herts] Anglujo) nun jam funkcias kaj prez. generalo Bastien la 12-an dec. inaŭguros nian Centran Sidejon.

„Freŝa Vento“, jen la titolo de la ĉef-artikolo en la nuna organo de IEL „Esperanto Internacia“ raportas, ke ĝis 20. nov. aliĝis:

Aŭstria Esperanto-Asocio
Belga Ligo Esperantista
Brita Esperantista Asocio
Germana E.-Ligo en Ĉeĥoslovakio
Centra Dana Esperantista Ligo
Societo Franca por la Propagando de E.
Nederl. E.-Asocio „La Estonto estas nia“
Norvega Esperantista Ligo
Pollanda Esperanto-Delegitaro
Sveda Esperanto-Federacio.

Krome jam kunlaboras kaj kredeble baldaŭ aliĝos la landaj asocioj de **Grekujo, Hispanujo, Italujo, Usono.**

Ĉefdelegitoj funkcias en **Aŭstrio, Belgujo, Britujo, Danujo, Francujo, Hungarujo, Italujo, Litovujo, Nederlando, Norvegujo, Portugalujo, Svedujo kaj Usono.** — **500** delegitoj en **30 landoj** jam aliĝis kaj novaj aliĝoj venas **20—30 ĉiutage.** — **Pli ol 600 aktivaj membroj en 32 landoj** krom la simplaj membroj aligitaj pere de la landaj asocioj. Multaj siatempe el UEA eksiĝintaj membroj aliĝis al ni. — La **jarlibro** aperos en **marto 1937** kaj ĝi estu ne nur senkolora listo de delegitoj sed ĉiama poŝlibro de la esperantistaro. — La **oficialaj organoj** „Heroldo de Esperanto“ kaj „Esperanto Internacia“ regule kaj bonege funkcias.

Aŭstria Esperantisto pro sia granda nuntempa disvastiĝo espereble multe rovos helpi al pligrandigo de la anaro ai IEL kaj kun plezuro tion faros!

IEL marŝas! Ĉia provo haltigi tiun marŝon aŭ starigi kontraŭ ĝi samcelan organismon estos vana klopodo, estos peko kontraŭ nia unueco, estus krimo kontraŭ nia afero, kontraŭ nia ideo kaj niaj idealoj mem!

Tial oni akceptu la faktojn ne jam estingeblajn, la rado de l'evoluo jam plu turniĝas, nin plu ne ekscitu la pasinteco — ĝi estas for kaj ne plu revenos. **Prefere ni laboru!**

Sed dum la prikonsilado de la statutoj ni faru niajn rimarkojn kaj kritikojn, prezentu niajn dezirojn kaj donu konsilojn. Tiam ni zorgu eviti la erarojn de la pasinteco. Kaj tiam, espereble en Varsovio dum la 29-a, ni povos festi ne nur la duonjarcentan jubileon de Esp. sed ankaŭ la **finan kaj definitivan unuecon de la tuta** sur **nepolitika kampo** aganta esperantistaro.

Dume ni **firme apogu** la gvidantojn de IEL! Ilia tasko ne estas facila. Ni ne malfaciligu ĝin per jam senutilaj riproĉoj. Ni mem elektis ilin siatempe, ili klopodis aranĝi la aferojn laŭ sia plej bona konscienco. Ili havis la sinceran intencon savi valoran aferon, kiu jam ŝajnis perdita. Se iuj ne volas ekkoni, ke niaj gvidantoj pro sia kuraĝa, rapida decido meritas nian dankon, **oni almenaŭ** — en la intereso de la afero — **donu sian apogon kaj kunlaboron! Ek al labor'.** (Laŭ artikolo de Teo Jung.)

Same AEA marŝas kaj ĉia provo haltigi ĉi tiun marŝon aŭ agi kontraŭ ĝi flanke de alia organismo estos vana klopodo, peko kontraŭ la unueco de la E.-movado, krimo kontraŭ nia afero, kontraŭ nia ideo kaj niaj idealoj, kontraŭ la Interna Ideo!

AEA prefere laboru kaj **ĉiu konscia samcelano subtenos ĝin!**

Nek niaj estraro nek membraro deziras luktadon kun samideanoj, ne apartenantaj al AEA. Kontraŭe, malkaŝe dirite, ni deziras fine sen-venen-igi la atmosferon! Agu ĉiuj same! Steiner.

Abbestellung der AE muß bis **Ende Dezember** erfolgen!

Pri propagando.

Komercisto, varbante nur unu monaton dum la jaro, bankrotiĝos.

Armeestro, estante nur parte en ofensivo, estos venkota.

Nur la esperantistoj opinias, ke sufiĉas mallonga propagando por havigi al si plenajn kursojn.

Do propagandu ĉiam, ĉie, ĉiel.

Gazetservo:

Artikoletoj „9. Aŭstria E.-Kongreso" kaj „Esp. en trafika servo" senditaj al 50 aŭstriaj gazetoj. Ni petas pri informo, kie aperis ĉi tiuj artikoletoj.

Al niaj karaj legantoj!

Kun granda plezuro mi povas konstati, ke grandaro da samideanoj fidele jam de la komenco de apero de AE, kiu nun ekaperos la 14:an jaron, estas niaj legantoj.

Al ili unuavice estu mia kora danko, sed ankaŭ al tiuj, kiuj iom post iom venis al ni, vidante, ke AE ĉiam laboris nur por Esperanto, klopodis helpi al enigado de Esp. en ĉiujn medioin kaj neniam havis intereson por politikaj aferoj sed nur por la interesoj de ian patrolando Aŭstrio.

AE, jam de komenco estas oficiala organo de Aŭstria E.-Asocio, la aŭstria reprezentanto de la mondorganizo, kiu nun sidas en London, Internacia Esperanto-Ligo. Ĝi sole rajtas esti Landa Organizo de Aŭstrio kaj tiamaniere ankaŭ la diversaj instancoj estas informitaj kaj, se necese, ĉiam denove estos informataj.

Nun je Kristnasko mi aldonas por ĉiuj miaj fidelaj abonantoj nove eldonitan vortareton, taŭga por disvastigo en via konatularo, kun la plej sincera deziro je bona Kristnasko-Festo kaj gratulo je feliĉiga Novjaro.

Sed Novjar-donacon mi ankaŭ alportas al mia fidela sekvantaro: **pliampleksigon** de nia kara AE, **ne-phaltigon** de la prezo kvankam AE je 25% pligrandiĝos, **plibonigo** de la aranĝo, **havigo** de belaj literaturaj artikoloj, **multaj bildoj, disvastigo** en la tuta mondo!

„Kuraĝe antaŭen" en la nova jaro al la laboro por Esperanto kaj nia bela lando Aŭstrio!

Kaj vi karaj samideanoj, fidelaj kaj ne ŝanĝeliĝemaj, ĉu alia gazeto donos al vi eble eron da plibonŝanco, donis al mi la kuraĝon, komenci la novan epokon de nia AE — disvastigo en 60 landoj — kaj vi povas fidi al mi, ke la afero ne estos efemera, sed jam certigata!

Via kara AE malgraŭ multaj kontraŭklopodoj nun estas la plej disvastigata gazeto el Aŭstrio kaj unu el la plej disvastigataj el la E.-gazetaro!

La abonprezon por 1937 bonvolu enpagi per aldonita enpagilo, S 4.60, kiom eble plej baldaŭ. Kiu sendos la monon ĝis **fino de dec.** ricevos **senpage** la libreton **„Antaŭaj cirkonstancoj"** (vendoprezo 60 g).

Ni ne „flankeniĝos", ni restos fidelaj al nia IEL, AEA kaj AE!

Al niaj AEA-grupoj!

Mi decidis doni por 1937 al po unu s-ano aŭ s-anino en ĉiu al AEA aliĝinta grupo **senpagan** abonon al AE.

Rekomendu al mi afable ĝis 25. dec. tiun senlaboran aŭ en malbonaj cirkonstancoj troviĝantan s-anon, al kiu mi sendu la gazeton. La eldonanto.

Invito al ĉiuj E.-societoj en Wien.

Nia grupo invitas la grupestrojn de la E.-grupoj en Wien, ke ili sabate la 19. dec. venu ja la 15 h en Intern. E.-Muzeon, unue por rigardi la Muzeon kaj poste por prikonsili la manieron de reciproka vizito en la arangoj de la unuopaj grupoj. Ne temas pri iu afero el organiza vidpunkto, simple la esp-istoj el Wien pli intense vizitu la arangojn de la diversaj grupoj kaj per tio venu en pli intiman kontakton por pli bona kaj amika interkonatiĝo! Ekz. Danubio arangos en januaro grandan kunvenon, la grupo en la X. distrikto en februaro, E.-Klubo en marto ktp. kaj la estroj de ĉiuj grupoj instigu siajn anojn partopreni en tiuj arangoj.

Tiamaniere ni montru, ke ni estas esperantistoj, kiuj ne deziras la enmikson de politiko en niajn E.-aferojn.

E.-Klub, Wien, I., Neue Burg.

Jubileo.

E.-Soc. **„Danubio"** festis la 16. de nov. la 25. datrevenon de sia fondo. Pli ol 150 s-anoj plenigis la feste ornamitan societejon. Prez. Rajm. Cech salutis kortegan kons. Steiner, kiu nome de la landa E.-Organizo Aŭstria E.-Asocio transdonis al la jubileanta societo la **Arĝentan Honorinsignon** kaj fiksis gin sur la bruston de la prez. Krome prez. Cech salutis prof. d-ron Jokl kaj aliajn. Kort. kons. d-ro Heeber, vicprez. de Danubio, faris la enkondukajn vortojn, prez. Cech historian skizon pri la 25-jara societa agado kaj prof. d-ro Jokl la festparoladon. Sekvis la honorigo de dir. Rudolf Kaftan kaj Oskar Popper, kunfondintoj de la societo. Post la paŭzo distra programo amuzis la gastojn. Post prelego de letero de ĉefredaktoro Nikolaus Hovorka, malhelpita veni, por mem reciti sian prologon, simfonia uverturo „Esperanto" kun granda aplaŭdo estis ludata de la komponisto Ernst Munkacsy kune kun d-ro Fritz Steiner. Lucy Marcus kantis arioin el operetoj, akompanita sur la piano de Fritzi Popper. Erich Straschnow recitis 2 E.-poemojn; Juli Tojoda el Tokio ravigis per 2 kantoj kaj ŝin akompanis sur la piano Ella Pfeffer. Gajaj liut-kantoj de Gustav Schlerka kaj agordion-sololudo de Karl Ulram finis la belan vesperon. La interligajn vortojn dum la amuza parto parolis Max Rud. Frey. Ni deziras pluain sukceson kaj progreson. AEA, AE.

Finfesto de Esp.-kurso.

Cseh-instruistino Marie Adamkova arangis kun la partoprenantoj en kurso de „Gastgewerbliche Arbeitsgewerkschaft" kursfinfeston, al kiu konsilisto de urbo Wien s-ro Bauer, disponigis la festsalonegon. S-ro Duch klarigis, ke G. A. transprenis la teknikan arangon de la festo pro tio, ke precipe la gastejmetiistoj devas interesiĝi pri mondhelplingvo, ĉar E. helpas la interligon de la popoloj. N. Hovorka salutis en E., dankis al la instruistino Adamkova pro ŝia oferema laboro kaj admonis la novulojn, resti fidelaj al E. Per transdono de E.-insignoj oni akceptis ilin en la s-anaro. Oni kantis la himnon, poste deklamis s-ro Morent kaj f-ino Eder poemojn, f-ino Lonja Rates arte dancis hindan dancon. Sekvis teatrajo „En malgranda hotelo" de Krysta, prezentita de la kursanoj.

Juli Tojoda el Tokio kantis delikatvoĉe japanajn popolkantojn kaj la negro Kola Ajaya rakontis tre interese pri sia hejma kontinento Afriko kaj prezentis popolkantojn el sia hejmlando. Liajn vortojn tradukis germanen Max R. Frey. Je la fino la teatrajo „La renkonto" tre bone plaĉis. Kunludis: f-inoj Adamkova, Falk, s-roj Max R. Frey, Jakob kaj Kreutel. Richard Kreutel.

Zamenhof-Vespero de AEA.

La 5. dec. AEA. arangis en la festsalono de „Gastgewerbliche Arbeitsgemeinschaft" Zamenhofvesperon. Ĉefredaktoro Nik. Hovorka faris la festparoladon, sekvis la himno kaj poste 3 unuaktajoj, tre bone prezentitaj de f-inoj Anny Krenek kaj Alice Falk kaj la s-roj Benard kaj Schrecker. Vicprez. kalk. kons. Frey klarigis germanlingve la enhavon.

„Antaŭaj Cirkonstancoj" de Nestroy, trad. H. Steiner: „Edzig-peto" de Tschechow, trad. d-ro Biehler; „Kara Frateto" de J. Wilhelm, muziko de Leo Fall, trad. Fritz Stengel. La muzikan parton faris kapelestro Leo Körner, la enscenigon Karl Marfeld-Neumann.

Inter la unua kaj la dua akto Leo Körner prezentis la valson „Esperanto", dediĉitan de kapelestro Franz Fleischer el Dory, Hungarujo, al la 28-a; ĝi sekvigis grandan aplaŭdon kaj ege plaĉis.

Vicprez. Frey dankis al prez. Steiner, ke li arangis la belan vesperon, al la aktoroj kaj al kapelestro Fleischer pro la belsonmelodia valso.

Kvankam nur ĉeestis proksimume 250 personoj, tamen regis bela harmonio, vera Zamenhofa spirito.

Dankon al konsil. Bauer pro grandanima subteno.

D-ro Max Höfer.

Eigentümer, Herausgeber und verantwortlicher Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.